Manlibreto

HEJMA EVANGELIA STUDO

Hejma Evangelia Studo | 1a eldono, aprilo 2022, v2.2
Serio *Suplementoj* (n-ro 1) – Gazeto de BAES
Brazila Asocio de Esperantistaj Spiritistoj
www.baes.org.br | kontakto@baes.org.br

Kovrilo: Galilea Maro | Foto de Dave Herring el unsplash.com

Senpaga disdono. Mendu vian presitan ekzempleron sendante retmesaĝon al la Asocio.

Redaktis: Cecílio Tomé | Grafikaranĝis: Leandro Abrahão Tradukis kaj konsilis: Paulo Sergio Viana kaj Jader Rodrigues da Silva | Provlegis: Estraro de BAES kaj Odília Milhomens.

Bibliografio (krom la libroj cititaj en la suplemento): Flugfolio pri Hejma Evangelia Studo, elpresita de Eldonejo Lorenz (sen dato); libro *Paz em casa, paz no mundo,* Editora Auta de Souza, 2018; broŝureto *O evangelho no lar e no coração,* elpresita de Brazila Spiritisma Federacio (sen dato).

Traduko al aliaj lingvoj estas tre bonvenaj. Ni simple petas sendi ekzempleron al la Asocio, ĉu presitan, ĉu bitan.

Ekpuŝu la butonon kaj senpage elŝutu aliajn bitmaterialojn.

Diferencoj kompare kun la antaŭa versio

Paĝo 6: ...oni povas entrepreni ankaŭ unuope. > ...oni povas entrepreni ankaŭ unuope, **kaj ke infanoj estas tute bonvenaj.**

Paĝo 6: pli ol du mil jaroj > **ĉirkaŭ du** mil jaroj

Paĝo 15: Aldono de informo pri reta komuna studo.

ENHAVO

Koncepto	p. 6
Rakonto: Kristana Kulto en la Hejmo	p. 7
Fundamento	p. 10
Utileco	p. 12
Kiel realigi ĝin	p. 14
Muziko: Celata Kunesto	p. 16
Preĝokolekto	p. 18

Laŭ nia vidpunkto, almenaŭ ĝis nun ne aperis ankoraŭ iu frazo resumanta ĝustan vivofilozofion, kian tiun eldiritan de Jesuo: "Amu unu la aliajn kiel mi amis vin", tio estas, ami ne esperante esti amata kaj ne atendante ian ajn rekompencon, ami ĉiam.

Chico Xavier

Koncepto

Hejma Evangelia Studo, aŭ *Evangelio en la hejmo*, konsistas en studado de la evangelio de Jesuo en familia rondo. Estas grave emfazi, ke tiun studadon oni povas entrepreni ankaŭ unuope, kaj ke infanoj estas tute bonvenaj.

Tiu familia kunveno estas tradicie nomata Evangelio en la Hejmo reference al epizodo, okazinta antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj en la domo de Petro – unu el la apostoloj de Jesuo. Tiun epizodon rakontas al ni la spirito Neio Lúcio en la libro *Jesuo en la hejmo*, mediume verkita de Chico Xavier. Legu ĝin ekde la laŭvica paĝo.

Foto: Gilles Mar (unsplash.com)

Kristana Kulto en la Hejmo

Pleniĝis je steloj la firmamento kadre de lunhela nokto, kiam Jesuo-Kristo, provizore gastigita en la domo de Simon-Petro, prenis la sanktajn skribaĵojn kaj, kvazaŭ Li volus ŝanĝi la direkton de la konversacio, kiu fariĝis sterila kaj malpli edifa, bonkore parolis:

– Simono, kion faras fiŝkaptisto, kiam li direktiĝas al vendoplaco kun la ĉiutagaj laborfruktoj?

La apostolo pensis dum momento kaj respondis heziteme:

– Majstro, kompreneble, li elektas la plej bonajn kaj belajn fiŝojn, ĉar neniu aĉetas restaĵojn de fiŝkaptado.

Jesuo-Kristo ridetis kaj demandis denove:

– Kaj argilaĵisto? Kion li faras por bone plenumi la taskon al kiu li sin proponis?

– Certe, Sinjoro – rediris, ne sen surprizo, la fiŝkaptisto – li modlas la argilon kaj konformigas ĝin al sia intenco.

Kun fulmobrila kaj kompatema rigardo, la Ĉiela Amiko insistis:

– Kaj kiel procedas ĉarpentisto por atingi la intencatan celon?

En sia simpleco, Simon-Petro tuj respondis:

– Li prilaboras la lignon, uzas adzon kaj mansegilon, martelon kaj ĉizilon. Alimaniere, li ne perfektigos la krudan lignopecon.

Jesuo-Kristo silentis dum iom da tempo kaj sekve aldonis:

– Tia ankaŭ estas la hejmo antaŭ la mondo. La hejma lulilo

estas la unua lernejo kaj la unua templo de la animo. Ĝi estas aŭtentika eksportejo de karakteroj por la komuna vivo. Se komercisto elektas la varon kaj lignaĵisto ne sukcesas prepari barkon ne modlante la lignaĵon al siaj celoj, kiel esperi sekuran kaj trankvilan komunumon se la hejmo ne perfektiĝas? La monda paco komenciĝas sub la tegmento en kiu ni rifuĝas. Se ni ne lernas vivi pace interne de kvar muroj, kiel esperi harmonion inter nacioj? Se ni ne kutimiĝas ami la plej proksiman fraton kunigitan al nia ĉiutaga batalo, kiel respekti la Eternan Patron, kiu ŝajnas al ni fora?

Jesuo-Kristo ekrigardis la modestan ĉambron kaj daŭrigis:

– Simon-Petro, ni ekstarigu ĉi tie, ĉirkaŭ ĉiuj, kiuj nin serĉas, fratan asistadon, ian novan lumon. Por via pano, la tablo de via domo estas ĝia hejmo. Sur ĝi vi ricevas de la Sinjoro la ĉiutagan panon. Kial ne instali ĉirkaŭ ĝi la kultivejon de la feliĉeco kaj paco en la konversacio kaj penso? La Patro, kiu, per la grundo, donas al ni la tritikon por la grenejo, sendas al ni la lumon per la Ĉielo. Se heleco estas la ekspansio de la

La monda paco komenciĝas sub la tegmento en kiu ni rifuĝas.

radioj, kiuj ĝin konsistigas, abundeco naskiĝas ĉe la greno. Tial, la Evangelio ne estis dis-konigita meze inter la popolamaso, sed ĉe la simpla loĝejo de paŝtistoj kaj bestoj.

Simon-Petro fiksis sur la Majstro siajn humilajn kaj brilajn okulojn kaj, ne trovinte la ĝustajn vortojn por sin esprimi, murmuris kun timemo:

Fariĝu via volo, Majstro!

Tiam, invitante la familianojn de la apostolo al edifa interparolo kaj nobla meditado, Jesuo-Kristo malvolvis la skribaĵojn de saĝeco kaj inaŭguris sur la Tero la unuan hejman kulton de la Evangelio.

> Spirita aŭtoro: Neio Lúcio
> El la libro *Jesus no Lar,* mediume verkita de Chico Xavier, eldonita de Brazila Spiritisma Federacio, 37a eldono, Braziljo, 2013.



En la verko *La senditoj* legeblas interesa kaj instrua ekzemplo de Hejma Evangelia Studo el la vidpunkto de la spiritoj (ĉapitroj 34, 35 kaj 36).

BAES disponas pri kelkaj ekzempleroj de la verko. Kontaktu la Asocion, por ricevi almenaŭ unu.

Ekpuŝu la butonon kaj aĉetu ĝin ekzemple ĉe Eldonejo Lorenz

Fundamento

La vorto *evangelio* estas grekdevena kaj signifas *bonan novaĵon*. Helpe de spiritismo la diraĵoj de Jesuo – iafoje vualitaj sub alegorioj kaj figuroj – fariĝas kompreneblaj laŭ ties profunda senco.

Pri Jesuo legeblas en *La libro de spiritoj* (la unua spiritisma verko, el 1857, publikigita de Allan Kardec), demando n-ro 625, ke Li estas *modelo por la homoj*:

> *Kiu estas la plej perfekta tipo, kiun Dio donis al la homo, kiel ties gvidanton kaj modelon?*
>
> *Vidu tiun tipon en Jesuo.*

Sekvas komento de Allan Kardec mem:

> *Jesuo estas por la homo la tipo de l' morala perfekteco, kiun la surtera homaro povas aspiri. Dio lin prezentas al ni kiel la plej perfektan modelon, kaj la doktrino instruita de la Kristo estas la plej pura esprimo de la dia leĝo, ĉar Jesuo estis animita de la dia spirito kaj estis la plej pura estulo iam ajn aperinta sur la Tero.*

En la libro *Sur la vojo al la lumo*, mediume verkita de Chico Xavier, la spirito Emmanuel, kiu aŭtoras la verkon, asertas, ke tiuj nekapablaj Lin kompreni “povas diri, ke liaj buŝaj formuloj estas malnovaj kaj konataj; sed neniu povas nei, ke lia ekzemplado estas unika ĝis nun, sur la surfaco de la Tero.”

*

La tiel nomata *Evangelio en la Hejmo* estas rekomendata de superaj spiritoj pere de la spiritisma literaturo kiel programo alpreninda por ĉiu persono kaj por spiritistoj aparte. Mencindus interalie diraĵoj de Emmanuel, d-ro Bezerra de Menezes, André Luiz kaj Joanna de Ângelis. Jen kion diras ekzemple d-ro Bezerra de Menezes:



(1831-1900)

“Ni laboru por enkonduko de l’ Evangelio en la Hejmo, kiom estos eble al ni. (...) Porti la helecon de la Bona Novaĵo en la familian templon signifas perfektigadi ĉiujn valorojn, kiujn la surtera vivo povas oferti al ni.”

El la libro *Temas da vida: Evangelho no lar*, mediume verkita de Chico Xavier, eldonita de CEU, San-Paŭlo, 1978.

Utileco



- Edifa dialogo inter familianoj;
- Estigo de paca etoso;
- Veko de sento de frateco;
- Kompreno de la instruoj de Jesuo kaj sekve la praktikado de ili;
- Subteno fare de superaj spiritoj
- Prilumo de la ĉirkaŭa medio (la kunveno utilas ankaŭ al najbaroj);
- Elvolvo de virtoj;
- Reciprokra korfaciliĝo.

“Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas; se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas la pordon, mi eniros al li kaj manĝos kun li, kaj li kun mi.”

Apokalipso, 3:20

Kiel realigi ĝin

Antaŭe

Estas rekomendate fiksi en la semajno tagon kaj tempon, kiam la kunveno povos regule okazi.

Jam dekomence oni lasu proksime kruĉon aŭ glason da akvo. Danke al la etoso kaj al la agado de la spiritoj, la akvo ekhavas bonfarajn proprecojn. Post la fino, la ĉeestantoj trinkos la energiumitan akvon.

Procedo

1. Komenca, spontana preĝo.
2. Lego de parto el la libro *La evangelio laŭ spiritismo*.
3. Post la legado la ĉeestantoj povas libere interparoli pri la temo de la legaĵo, elstarigante tiujn punktojn, kiuj kontentigis iliajn moralajn bezonojn kaj respondis al iliaj intimaj demandoj.
4. Fina preĝo.
5. Disdono kaj trinko de la akvo.

Kunagado

Se vi deziras esti helpata en la komenco, BAES volonte helpos vin realigi la diritan studadon. Dum tri sinsekvaj semajnoj iu sperta volontulo povos entrepreni ĝin kune kun vi. Sufiĉas kontakti nin, tiel ke ni povu ĉion aranĝi.

Skeme





Pri *La evangelio laŭ spiritismo*: ĝi enhavas “la eksplikadon de la moralaj maksimoj de la Kristo, ilian konformecon kun spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo.” En ĝi estas klarigitaj kaj komentitaj pli ol 800 versikloj el la evangelio de Jesuo.

Ekpuŝu la butonon kaj senpage elŝutu ĝin kaj ankaŭ aliajn librojn.

Unufoje monate okazas reta komuna studo. Kontrolu la kalendaron en la retejo de BAES (baes.org.br).

Muziko
CELATA KUNESTO

Aŭtoro: Cesar Tucci
El la portugala tradukis Tarcísio Lima
Ekpuŝu la butonon kaj aŭskultu la muzikon

C Am Dm
Dum falis vesper'
G7 C Em/B
En Kapernaum'
Am Dm7 D9(7)/F#
La dom' de Simono, tre sim---pla,
G Gm6
Laŭ la komunum',
A/G D7/F#
Pleniĝis per pac'
Dm7/F Fm6 Em7
Kaj per luma flu'
Am Dm7 D9(7)F#
Dum sonis la vortoj e-ter-- naj
G C F/C
De l' Majstro Je-su'.
C Am Dm
Surbilde jen mi,
G7 C Em/B
Tiama infan',
Am Dm7 D9(7)/F#
Ĉe l' fratoj Simon', Jakob', Le---vi
G Gm6
Andre' kaj Johan'

A/7 D7/F#
Mi vidis ĉe l’ ma-ro,
Dm7/F Fm6 Em7
Kaj ĉi en mi mem
Am Dm7 D(9)/F#
De tiu mo-men-to por ĉi--am
G C F/C
Ĝermadi fidsem’.
C F7 Em7 Am
Mi tiel mal-gran-da ankoraŭ,
Dm(9)7 G
Ĉe l’ si-tua-ci’,
D7/F# F7 Em7
Ho, e-ble Jesu’
Am Dm(9)7 G
Min invitus pro--me--ni kun Li
E7/G# Am Am/G F
Sur--kor--te de l’ dom’ de Simono
D7/F# G(11)7
Kaj sub la lun--lum’
G E7/G# Am Am/G F
Dum blo-- vis kare---se venteto
Bb
Kun mara parfum’
D(7)b5/Ab E7/G# Am(9)7
Li a---vertus min
Em7 Am G/B C
Ke jam tem-pus, ke re-ve---nu mi
Am Dm7 D(9)7/F#
“Ni baldaŭ kunestos de---no---ve
G Fm C/E F#°
Ĉe via Hej--me-vange-li’ ”

Daŭrigo sur p. 19

Preĝokolekto

Eltiraĵo el la antaŭparolo de la ĉapitro 28
de la verko *La evangelio laŭ spiritismo*

"La Spiritoj ĉiam diradas: 'La formo estas
nenio, la penso estas ĉio (...)'."

"La Spiritoj ordonas nenian absolutan formulon de preĝoj; kiam ili donas formulojn, ili celas **fiksi** la ideojn kaj precipe **atentigi** pri iuj principoj de la doktrino spiritisma. Tiuj formuloj celas ankaŭ **helpi** la personojn, kiuj estas en embaraso por esprimi siajn ideojn, ĉar estas personoj, kiuj ne kredas, ke ili efektive preĝis, se iliaj pensoj ne estis formulitaj."

"La kolekto da preĝoj en tiu ĉi ĉapitro [28] estas elekto, farita el inter la preĝoj diktitaj de la Spiritoj en pluraj cirkonstancoj; ili eble ja diktis aliajn per malsamaj vortoj, taŭgaj por difinitaj ideoj aŭ apartaj okazoj, sed la formo ne gravas, se la fundamenta penso estas la sama. La celo de la preĝo estas levi nian animon al Dio; la diverseco de la formuloj nenian diferencon devas krei inter la homoj, kiuj kredas al Li, kaj des malpli inter la adeptoj de Spiritismo, ĉar Dio akceptas ĉiajn preĝojn, se nur ili estas sinceraj [...]."

"Spiritismo rekonas kiel bonajn la preĝojn de ĉiaj kultoj, kiam ili estas direktataj el la koro kaj ne el la lipoj; nenian ĝi trudas, nenian ĝi malaprobas; Dio estas tro granda, laŭ Spiritismo, por forpuŝi la voĉon, kiu petegas de Li aŭ kantas al Li laŭdojn tial, ke ĝi tion faras en unu maniero kaj ne en alia. Kiu ajn anatemus la preĝojn, kiuj ne estas en lia formularo, tiu pruvus, ke li ne konas la grandecon de Dio. Kredi, ke Dio nur akceptas difinitan formulon, estas atribui al Li la malgrandecon kaj pasiojn de la homaro."

“Esenca kondiĉo de la preĝo, laŭ Sankta Paŭlo, estas, ke ĝi estu komprenebla, por ke ĝi povu paroli al la spirito; por tio ne sufiĉas, ke ĝi estu dirata en lingvo komprenata de la preĝanto; estas preĝoj en vulgara lingvo, kiuj ne diras multe pli al la penso, ol se ili estus en fremda lingvo, kaj kiuj tial ne iras en la koron; la malmultaj ideoj, kiujn ili enhavas estas ofte sufokitaj de la superabundeco de vortoj kaj la mistikeco de la lingvo.”

Allan Kardec (1804-1869)

“La precipaj kvalitoj de la preĝo estas klareco, simpleco kaj koncizeco, sen frazaro senutila kaj laŭtaj epitetoj, kiuj estas nur falsbrila ornamaĵo; ĉiu vorto devas trafi sian celon, veki ideon, skui koran fibron; unuvorte, ĝi devas pripensigi; nur laŭ ĉi tiu kondiĉo la preĝo povas trafi sian celon, alimaniere ĝi estas nur bruo.”

Daŭrigo

C Am Dm7 D(9)7/F#
“Ni baldaŭ kunestos de---no---ve
G Fm C/E F#°
Ĉe via Hej--me-vange-li’ ”
C Am Dm7 D(9)7/F#
“Ni baldaŭ kunestos de---no---ve
G Bb Ab G F Ab Bb
Ĉe via Hej--me-van-ge-li’ ”_____
C F/C C7M
O_____

baes.org.br